„Mutig vorwärts!" **Aŭstria Esperantisto** „Kuraĝe antaŭen!"

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

6a jaro. N-o. 11 Monata Novembro 1929

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Lektorat für Esperanto an der Technischen Hochschule in Wien.

Nach Erreichung seines 70. Lebensjahres trat der verdienstvolle bisherige Lektor für Esperanto, Herr Direktor Josef Schamanek, der seit Errichtung des Lektorates im Jahre 1917 in diesem Amte tätig war, in den Ruhestand.

Ueber Vorschlag der Technischen Hochschule in Wien wurde als neuer Lektor Landesschulinspektor Hofrat Dr. Franz Wollmann, Direktor der Staatsprüfungskommission für Esperanto, vom Bundesministerium für Unterricht neu bestellt.

Nationalrat Glöckel, Präsident des Stadtschulrates Wien, gab auf dem Kongreß der „Internationalen Arbeitsgemeinschaft für Neue Erziehung" in Helsingör, bei dem die Verschiedenheit der Sprachen große Schwierigkeiten verursachte, der Hoffnung Ausdruck, daß nach Einführung der Welthilfssprache dieser unhaltbare Zustand verschwinden werde! (Bericht der Weltvereinigung der Esperanto sprechendeu Lehrer-Leipzig)

Der **Grazer Stadtschulrat** hat heuer auch Esperanto als Freigegenstand für die Hauptschulen aufgenommen. Hiezu meldeten sich an den dritten Hauptschulklassen 300 Schüler. Der Esperanto-Unterricht hat am 1. Nov. begonnen und wird 2 Jahre dauern. Wöchentlich 2 Unterrichtsstunden. In 3 Klassen unterrichtet Bezirksschulinspektor Storm, in 2 Fachlehrerin Frau Schwarz.

Volkshochschule Wiesbaden. Auch im Herbstlehrgang 1929 drei Esperantokurse.

Die **Französische Handelskammer in London** beschloß in ihre offiziellen Veröffentlichungen stets einen Artikel über ein aktuelles kaufmännisches oder industrielles Gebiet in Esperanto aufzunehmen.

Radiosender in Hilversum (Welle 1071 m) sendet am **21. Nov.**, 8 Uhr abends, im Rahmen des Internationalen Programmes „Österreichische Musik". Die einzelnen Programmpunkte werden in Esperanto angekündigt. Guter Empfang wolle an die Radiostation Hilversum, Niederlande, gemeldet werden.

Radio-New York. 6 Stationen senden regelmäßig Esperantokurse und Vorträge. Auch die anderen Sender der Vereinigten Staaten nehmen Esp. immer mehr in ihr Rundfunkprogramm auf.

Radio Minsk sendet jeden Dienstag 20.50 bis 21.30 h in Esp. Sprecher: Dim. Snejko, Minsk Postfach 33, USSR.

Radio Ljubljana gibt jeden Mittwoch um 20 Uhr 30 sein Programm bekannt und zwar auch in Esperanto. Im Herbste beginnt ein Esperantokurs.

Intern. Transportarbeiter-Föderation (ITF) gibt durch Rundschreiben an sämtliche ihr angeschlossenen Verbände bekannt, daß sie beabsichtigt, das bisher in 4 Sprachen erscheinende Mitteilungsblatt auch in Esperanto herauszugeben. Bestellungen (Rm. 4) an Gen. Nathans, Int. Transportarbeiter-Föderation, Vondelstraat 61, Amsterdam-West. (Arbeiter-Esperantist)

Der **Deutsche Lehrerbund** mit mehr als 150.000 Mitgliedern hat bei seiner Tagung, Pfingsten 1929, in Dresden folgende Entschließung angenommen: „Es sollen alle Bemühungen, welche in den Kreisen der Lehrerschaft und der Schüler die Verbreitung der Welthilfssprache zum Ziele haben, unterstützt werden".

Minas Geraes Bello Horizonte (Brasilien). Der Direktor des statistischen Dienstes hat seiner Regierung beantragt, in ihrem offiziellen Organ für Auslandsdienst statistisches Material über den Staat Minas Geraes in Esperanto zu veröffentlichen.

Al la esperantistaro tutmonda.

Antaŭen ĝis la venko!

Antaŭ unu jaro, dank' al la afableco de la redakcioj de »Heroldo«, »Esperanto« kaj aliaj naciaj E.-organoj, ni povis publikigi »Alvokon al la esp-istaro« kun la peto, ke ili flankenĵetu ĉiujn disputojn pri bagatelaj aferoj kaj laboradu en tuta harmonio kaj konkordo por antaŭenpuŝadi nian sanktan aferon.

Kun sincera ĝojo kaj dankemo ni povas konstati hodiaŭ, ke tiu alvoko ricevis bonkoran akcepton. Leterojn mi ricevis el multaj landoj, de konatoj kaj nekonatoj, promesantaj subtenon de miaj klopodoj. Tiuj promesoj estas ĉie plenumitaj. Lastan jaron, en Anverpeno, atmosfero de malcerteco kaj suspekto regis super la kongreso, sed en Budapesto ekzistis nur la plej varma kaj sincera amikeco kaj frateco. La spirito de Zamenhof estis inter ni kaj benis niajn laborojn.

La ĵus okazinta universala kongreso en Budapesto, samkiel la Antaŭ-Kongreso en Vieno, estis veraj triumfoj, kiuj donos — ne nur al la partoprenintoj, sed ankaŭ al ĉiuj samideanoj — novan kuraĝon kaj pli grandan entuziasmon. Al ĉiuj, kiuj tiel longatempe, pacience kaj lerte laboradis por efektivigi tiujn sukcesojn, ni deziras ankoraŭfoje esprimi en la nomo de la tuta esperantistaro nian plej profundan dankon. Ili meritas nian laŭdon kaj kun ĝojo mi al ili gratulas kaj dankas.

En la daŭro de la pasintaj dekdu monatoj la bona ŝipo »Esperanto« veturis sur trankvilaj maroj, sed kvankam ĝi faris bonan progreson, ankoraŭ estas longa distanco inter ĝi kaj la sopirita haveno de niaj esperoj. La ŝipanoj nepre devas laboradi senĉese por gvidi ĝin laŭlonge de rokoj kaj sablaroj, devas provizi ĝin por la necesaĵoj por havigi la potencon veturi antaŭen senhalte. En unu vorto ni devas havigi pli kaj pli da monrimedoj por plifortigi nian propagandan kason. Mi ne intencas peti de la samideanaro monon hodiaŭ. Mi nur deziras rememorigi ilin, ke nia afero dependas de tri faktoroj: ladorado, pacienco kaj mono. Laborado sen pacienco ne daŭras longe. Laborado kaj pacienco sen financa helpo ne havigas grandiozajn rezultatojn.

Ne estas necese, esti milionulo por fari financan helpon al nia afero. Eĉ la plej malriĉaj povas facile trovi metodon por antaŭenpuŝadi nian lingvon. Ni ĉiuj kredas, ke E. estas unu el la plej grandaj benoj jam donacitaj de la Bona Dio al la homaro, pere de la genio de homo. Tial ni devas esti ĉiam pretaj fari oferojn por sukcesigi ĝin. Kiamaniere? Jen kelkaj sugestoj:

1. Ĉu vi jam fariĝis ano de via nacia asocio? Se ne bonvolu pripensi la eblecon senprokraste, ĉar sen via aliĝo la propagando de Esperanto en via lando nepre suferos. Bona esperantisto estas tiu, kiu helpas laŭ ĉiuj povoj, ne nur tiu, kiu faras nur publikajn paroladojn. Ĉiu el ni kapablas helpi. Ne lasu la laboradon al la aliaj, sed partoprenu vi mem en la glorinda tasko, al kiu nia kara majstro dediĉis sian tutan vivon.
2. U. E. A. jam faris grandajn praktikajn servojn al nia movado, sed se vi tuj aliĝos al tiu asocio, kune mil aliaj samideanoj, U. E. A. gajnus pli grandan potencon kaj kapablus fari eĉ pli bonajn servojn ol antaŭe.
3. Se restas al vi monrimedoj aŭ se via kas-stato tion permesas ĝenerale, helpu ankoraŭ al aliaj esperanto-entreprenoj kiel ekzemple al la subteninda semajna organo »Heroldo de Esperanto«. Pligrandigo de ĝi signifus plifortigon de nia diversflanka propagando.

4. Fine ne forgesu la esperanto-eldonejojn, kiuj faras grandajn oferojn por disvastigi bonan kaj utilan literaturon en Esperanto. Aĉetante seriozajn eldonaĵojn vi praktike helpas al la plenumo de la kulturtasko de nia lingvo.

Helpu al ni kaj ni reciproke faros ĉion laŭpove por helpi al vi. En Budapesto I. C. K. esprimis sian pretecon helpi al la naciaj societoj rilate la plifortigon de ilia interna organizado. Tial, se en via lando ekzistas malfacilaĵoj, sendu detalojn al ni kun peto — kompreneble oficiala —, ke ni zorge ekzamenu la aferon kaj preparu taŭgajn rimedojn el nia pli granda spertado.

Plia afero, pri kiu I. C. K. deziras helpi al ĉiuj, estas organizi universalan demonstracion en ĉiuj regionoj de la Mondo je la datreveno de l' naskiĝtago de nia majstro. Ĝis nun div. societoj agis laŭ sia propra ideo, sed sen ia komuna celo. Ni devas uzi la okazon por grandioza reklamado pere de la ĵurnaloj, la preĝejoj, la radio kaj de la propraj kunvenoj. Multaj el vi eble havas bonegajn sugestojn pri tiu ĉi afero. Sendu ilin al I. C. K. (Adreso: Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, 1, Tour de l'Isle, Genève), por ke ni povu elekti la plej bonajn kaj poste transsendu ilin al la div. societoj pere de nia gazetaro kaj niaj cirkuleroj.

Mi deziras montri al vi ĉiuj, ke I. C. K. ne estas nur surpapera komitato, sed vere vivanta kaj kapabla centra komitato de la tuta E.-movado, ĉiam preta helpi iamaniere al eĉ la plej malgranda kaj plej malproksima grupeto esperantista. Legu la raporton pri nia agado de la pasinta jaro en la kongresa libro de Budapesto aŭ en la oficiala dokumentaro pri Budapesto, aperonta post nelonge, kaj vi pli klare komprenos la grandecon kaj diversecon de nia laborado.

En Budapest I. C. K. havis la privilegion, en la nomo de la tuta esperantistaro prezenti honormedalon al kvar multe estimataj samideanoj kiel dankesprimon por la grandegaj servoj, kiuj ili, en la daŭro de multaj jaroj, faris por Esperanto. La personoj honorigitaj estis generalo Sebert, profesoro Cart, s-ro Warden kaj d-ro Privat. La unua jam de longe devis sin deteni de plua laboro pro sia aĝo kaj malsano, sed feliĉe la aliaj ankoraŭ restas ĉe la batalfronto Mi salutas ilin kaj esperas, ke ili estos por vi, same kiel por mi mem, ekzemploj, kiuj helpos vin fari ĉion en via povo por nia amata kaj alta idealo.

Ni ĉiuj serĉas feliĉon. La plej facila maniero por ĝin atingi estas per servado al ĉiuj, ĉar tiu, kiu faras aliajn feliĉaj, ĉiam ricevas mem feliĉon. Do laboradu por Esperanto kaj pere de Esperanto via vivo fariĝos riĉa kaj feliĉa.

Sheffield 30. 9. 29. John Merchant, Prezidanto de la I. C. K.

Ni intencas eldoni por 1930 **adresaron** de la aŭstriaj esp.-istoj kaj E.-grupoj, kiu enhavu precizan adreson kun profesio kaj ĉu korespondado (letere, per ilustr. poŝtkartoj, ŝanĝo de poŝtmarkoj ktp.) estas dezirata. Sendu tuj vian adreson ktp. al ni kaj instigu **ĉiujn viajn konatojn** al sama agado. La prezo por enpresigo de la nomo estas 30 g po persono aŭ grupo (en neuzitaj poŝtmarkoj!), tiu de la adresaro 60 g. afrankite. Sed vi devas sendi tiujn sumojn ĝis fino de januaro al ni. Post tiu dato **la** adresaro kostos 1 S.

Abonantoj de AE por 1930 **nenion** pagos por enpresigo, ili nur a pagos 40 g por la afrankota adresaro, tial ilia abonprezo estos por 1930 S 5.20.

La adresaro estos sendata ankaŭ eksterlanden!

Se vi deziras helpi nian aŭstrian movadon, varbu ĉiu **po unu** novan abonanton al Aŭstria Esperantisto! Vi ricevos **senpage** kiel rekompencon la adresaron 1930.

Grava alvoko.

Al la tutmonda esperantistaro.

La honoraj kasistoj Margaret kaj Paul Blaise, »Bonveno«, 47 Manor Way, North Harrow, Middx., Anglujo dissendis al la gazetaro esperantista alvokon, el kiu ni represas la plej gravan parton:

Karaj helpemaj amikoj,

1924 Viena deficito.

Al vi ni nin turnu kun la celo elkuraci por ĉiam la malsanon, kiu ĝenas kaj ĉagrenas ne nur a korpon sed ankaŭ la veran spiriton de la E.-movado.

Preskaŭ ĉiu samideano aŭdis pri la grava mondeficito kiu rezultis el la Int. E.-Kongreso okazinta en Vieno 1924.

Multaj ridis pri tio, multaj mokis, ankoraŭ pli multaj kondamnis. Aliflanke kelkaj sindonemuloj donacis al la malp'ena kaso, kaj, intertempe, malgranda grupo de Vienaj samideanoj : kre suferis. Dume la ĝenerala esp.-istaro daŭrigis sian feliĉan vojon tute nekonscia pri la kruelaj faktoj.

Nu, dum la Kongreso en Budapest, ĉe speciala kunveno de la Ĝenerala Estraro de la E.-Movado, post alvoko de s-ro Stettler, Prez. de UEA (kiu ĝisfunde esploris la tutan malgajan historion), oni elektis malgrandan komitaton, kies tasko estas fari lastan klopodon kolekti laŭeble sufiĉe da mono por pagi la deficiton. Ĝi konsistas el:

S-ro J. Merchant, Prez. de ICK.

S-ro Ed. Stettler, Prez. de UEA.

S-ro F. Schoofs, Sekretario-kas. de KR.

S-ro P. Blaise, Honora Kas. de BEA, kaj Komitatano de UEA (kiu nun estas komisiita kolekti la monon).

De la ŝuldo de sv. fr. 15.540 (tuj post la kongreso) la malfeliĉaj LKK-anoj pagis sv. fr. 5623, UEA donacis sv. fr. 1000.— kaj tial la ŝuldo m lpliiĝis je sv. fr. 3765.— **Kvar** modestaj esp.-istoj, bonfame konataj kaj honestaj, estas la sole ŝarĝitaj. Ili sendis korkrion al la prez. de UEA, s-ro Stettler (kiu faris samtempe propran malavaran donacon). Li promesis kolekton por enspezi ni diru sv. fr. 5000,—, por pagi la restantan deficiton kaj se eble, iomete helpi al tiuj Vienanoj, kiuj dum la lastaj jaroj sin senigis de ĉio por pagi la diritan sumon de sv. fr. 5623.

Ĉu inde estas, ke nur kelkaj suferu pro ŝuldo, kiu tuŝas la honoron de la ta tuta esp.-istaro, ke ni parolu pri amo al la homaro ĝenerala kaj ignoru la malfeliĉulojn en nia rondo mem, ke ni festu novajn kongresojn kaj forgesu la malĝojon de kelkaj malfeliĉaj organizintoj de la deksesa?

Decidu, ke vi tuj alprenos **vian** parton de la terura ŝarĝo, kiu nun tiel premegas sur la ŝultrojn de niaj bonaj Vienaj amikoj. Kial ne tiamaniere solenigi la alproksimiĝantan Zamenhoftagon per malavara donaco?

Jen la neceso serĉi vian monujon. Ĝin malfermu larĝe!

La kolektado por Aŭstrio povos okazi plej bone per alsendo de la mono aŭ al

Reg. kons. Steiner, prez. de AEA, Wien, I. Augustinerstraße 7 (ankaŭ en neuzitaj aŭstriaj poŝtmarkoj) aŭ

Ges. P. Blaise (v. la supran adreson)

UEA., 1. rue Tour de l'Ile, Genève

S-ro F. Schoofs, 11, rue du Petit Chien, Anvers, Belgujo.

Ĉiu sumo estos kvitancata en »Esperanto«.

La plej bela horo en mia Esperanto-vivo estas, ke la supre menciitaj gravaj personoj nun energie provos forigi la deficiton kaj helpi niajn Wien-ajn samideanojn. Elkore mi dankas ilin! En decembro 1925 mi jam faris la unuajn paŝojn helpi la forigon de la deficito. En Locarno (Paskoj 1926), Danzig (1927) kaj Antwerpen (1928) mi ĉiam denove pledis, ke ICK entreprenu la necesajn paŝojn, forigi ĉi tiun malagrablan aferon kaj helpi la malfeliĉajn LKK-anojn.

Ni nun ege ĝoju!!!

La nialandaj samideanoj jam grandparte donis sian obuluson, de ĉiuj niaj aranĝoj ni donacis 25% al la deficito.

Sed ankaŭ nun, karaj aŭstriaj samideanoj, **ne postrestu!**

Sendu al mi, kion vi povas dediĉi al ĉi tiu certe bonega faro! Mi publikigos la liston de la donacintoj en ĉiu numero de AE kaj komencas mem la liston per malgranda donaco de Ŝ 10.—. Ĉiu laŭ sia povo!

Steiner.

22a Universala Kongreso de Esperanto, Oxford, Anglujo.

2.—9. de aŭgusto 1930.

Prez.: Bernhard E. Long,
Vicprez.: Prof. W. E. Collinson
LKK.: Prez.: Robert Robertson
Kas.: Paul Blaise
Sekr.: C. C. Goldsmith F. C. I.
Komit.: S-ino H. L. Blaise, F. B. Bourdillon, M. A., J. Brennan, R. East, W. A. Gething, J. Merchant, L. N. Newell, f-ino V. C. Nixon, B. A., W. J. Rayson, K. R. C. Sturmer, F. E, Wadham.

Adreso por leteroj: Sekretario, 22a Kongreso de Esperanto, 142 High Holborn, London, W. C. 1.

Aliĝiloj aldonotaj al nia gezeto.

Kotizo: Oportuna maniero sendi ĝin estas per Brita ŝtatbileto por £ 1, havebla ĉe bankoj kaj sendota en registrita letero antaŭ la 1. julio 1930. Post tiu dato la kotizo estos duono pli.

Aŭstria Esperanto - Kongreso en 1930 okazos antaŭ la XXII. (Oxford) en Linz la 30. kaj 31. de julio.

Esperanto en New Zealand.

Delegacio de esp.-istoj kaj instruistoj faris en aŭdienco ĉe la ministro por instruaferoj de New Zealand, s-ro H. Atmore, la proponon enkonduki E.-on en ĉiugradajn lernejojn de la lando. La ministro respondis, ke la granda distanco de la lando al la kontinentoj aliaj ne necesigas la tujan solvon de la demando. Li deziras priparoli la aferon kun siaj kolegoj kaj informos la delegacion pri la rezulto. (»La Suda Kruco«-Melbourne)

FREMDULPROPAGANDO.

Raporto de la reprezentanto de Aŭstria Ministerio por Komerco kaj Trafiko, sekcia konsilisto inĝ. Erwin Deinlein, en la V. internacia Kongreso de Propagando, Warszawa septembro 1929, pri la spertoj faritaj pere de fremdulfrekventpropagando en Esperanto.

»Rilate al la dum la lastjara kongreso en Budapest priparolita demando (Punkto XXVI) koncerne fremdulfrekventvarbadon pere de Esperanto, mi havas la honoron komuniki al vi, ke la Ministerio por Komerco kaj Trafiko denove en ĉi tiu jaro eldonis en Esperanto la antaŭ vi kuŝantan prospekton »Aŭstrio« kaj rikoltis pere de ĝi grandan sukceson. El multnombraj alskribaĵoj kaj el artikoloj en la Esperanto-gazetaro evidentiĝas, ke oni en ĉi tiuj rondoj vidas en la E.-eldonado specialan ĝentilecon, kiu kapablas, veki simpatiojn al la eldonanta lando. La eldonado estis despli konvena, ĉar ĉijare estis malfermata en la kadro de fama Aŭstria National-Bibliothek aparta Internacia Esperanto-Muzeo, kiu kaŭzis la viziton de 700 esperantistoj el 30 landoj. Sed ankaŭ ĉiutagaj gazetoj diverslandaj raportis pri la progreso de fremdulfrekventvarbado flanke de Aŭstrio pere de Esperanto.

La Ministerio por Komerco kaj Trafiko sekve konsideras la eldonadon de propagandiloj por fremdulfrekvento en Esperanto vere utila kaj intencas ankaŭ venonttempe sekvi la komencitan vojon«.

Tutmonda-Polica-Ligo

estu rekonstruota. Ĉiuj iamaj membroj kaj tiuj, kiuj havas intereson pri la afero, sin turnu pro informoj al Verwaltungs-Inspektor A. Gräfe, Leipzig C, 1., Polizeipräsidium.

Lektorato por Esperanto en Teknika Altlernejo en Wien.

Nia meritplena s-ano direktoro Josef Schamanek post dekdujara funkciado kiel lektoro pensiiĝis (li jam pasis sian 70. vivjaron).

Laŭ propono de Teknika Altlernejo landa lernejinspektoro, kort.-kons. d-ro Franz Wollmann, direktoro de Ŝtata Ekzamenkomisiono por Esp., estis de Ministerio por Instruaferoj eknomata lektoro por Esperanto.

Ni esprimas nian sinceran denkon al s-ano Schamanek pro lia senlaca laboro. Li ankoraŭ multajn jarojn estu aktiva membro en nia movado! Al la nova lektoro nia s-ano d-ro Wollmann, elkoran grat. lon! Por AEA: Steiner, prez.

Esperanto en la Graz-aj ĉeflernejoj.

Nia samideano distrikta lernejinspektoro Storm sukcesis, ke la urba lernejkonsilantaro enkondukis E. en la ĉeflernejojn. En la triaj klasoj sin anoncis 300 geknaboj. 5 kursoj ekfunkciiĝis la 1. de nov. Ni elkore gratulas al la Grazanoj kaj speciale al insp. Storm.

Parolantaj filmoj kaj Esperanto.

Du gravaj kinematografaj kompanioj en Usono ĵus provis E.-on por parolantaj filmoj.

Ĉe Metro-Glodwyn-Mayers Corp., 2d. Ave. 127 str., New York City s-ro Parish faris kelkminutan paroladon en angla lingvo pri E., enŝovante kelkajn frazojn en E.

Ĉe Paramount Famous Lasky Corp., Paramount Bldg., Times Square, New York City s-ro Hetzel, prez. de Amerika E.-Asocio, kaj s-ino Chomette faris dialogon en E.

Ni atendu la rezultaton de tiuj certe tre interesaj provoj kaj ni gratulu la du kompaniojn.

Imitinda!

Franca Komerca Ĉambro en London laŭ iniciato de s-ro Gueritte aperigas de nun en sia oficiala Bulteno de la Ĉambro artikolon en Esperanto pri komerca aŭ industria aktuala temo. Ĉi tiu ekzemplo estu instigilo al aliaj gravaj tiaj institucioj!

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Leteradreso: I. Augustinerstraße 7

Nia oficejo estas malfermita ĉiun mardon, ĵaŭdon kaj sabaton de la 9—12 h.

La ekspozicio en Prunksaal nur estas videbla post antaŭanonco.

Multa laboro estas farota kaj **helpemuloj estas petataj viziti nin.**

Internacia Honora Komitato:

Novaj membroj:

Danzig:

D-ro H. Strunk, senatano por sciencj, artoj kaj popolklerigado en Danzig

Esperantujo:

S-ro E. Stettler, kunfondinto, honora prez. kaj nuna prez. de UEA. en Bern.

D-ino Lydia Zamenhof en Warszawa

Internacia Kuratora Komitato.

Novaj membroj:

Latvujo:

(Erare ili ne aperis en la lasta listo!)

Edgaro Grot, ĵurnalisto, Riga
Talivaldo Indra, instruisto, Riga
Vladimiro Ŝmurlo, Riga

Esperantujo:

Theo Jung en Köln

Pro manko da loko listo de la donacintoj en la venonta numero.

Eĥoj.

Genève, 30. 10. 29.

S-ro Registara Konsilanto H. Steiner.

Tre estimata samideano,

ni sendas al vi ĉi-kune novan alvokon de nia prezidanto sro. John Merchant kaj estos tre dankemaj al vi, se vi bonvolus ĝin publikigi en la plej proksima numero de via organo. Ni esperas, ke ankaŭ kontentigos vin la mencio, ke la Antaŭkongreso de Vieno estis brila aranĝo. La gazetara kritiko estas unuanima pri tio.

Ni uzas la okazon por esprimi al vi en la nomo de ĉiuj niaj komitatanoj nian koregan dankon pro via energia, laŭcela kaj senlaca klopodado. Nur dank' al ĝi kaj via bona gvidado de la laboroj tia sukceso estis atingebla.

Nian dankesprimon ni interligas kun nia gratulo pro via nomigo kiel registara konsilanto. Tiu promociigo sendube plej klare esprimas la valoron, kiun donas al via laboro la registaro de Aŭstrio. Via modelo estas imitinda kaj montras, kiamaniere per ideala kaj praktika laboro oni povas utili ne nur al Esperanto, sed profiti ankaŭ persone. Ni scias, ke tiu neantaŭvidebla nomigo

ne estis celo de via klopodado, sed certe la kronado de via penado, bone meritita. Ni ankaŭ estas certaj, ke vi nun ne ripozos, sed kontraŭe daŭrigos per sama fervoro kaj anergio kielantaŭe
Kun denovaj bondeziroj ni restas plej s.-ane
via
ICK. de la Esp-Movado
Por la Prezidanto:
Rob. Kreuz, Ĝen. Sekr.

»Esperanto«-Genéve raportis en n-ro 11 en longa artikolo kun la bildo de Prezidanto Miklas. En aparta artikolo pri la fondinto de IEMW. Steiner kun ties bildo.

»La Movado«-Paris: «La unuan fojon en la historio de E. Ŝtatestro parolis en oficiala ceremonio plej simpatie pri nia lingvo kaj eĉ uzis ĝin. Tiu unua Ŝtatestro estas la Respublika Prezidanto de Aŭstrujo Wilhelm Miklas . . .«. »Sed la plej solena tago estis la 1-a de aŭg. Dum la tuta Viena polico estis mobilizita kontraŭ la atendataj komunistaj manifestadoj, dudekdu esperanta policistoj deĵoris en la centro de la urbo por helpi samideanojn« ». . . S-ro Miklas, Prezidanto de la Respubliko, estas modesta kaj demokrata homo . . Sed tiun tagon, interrompante la feriojn, la Prezidanto bonvolis reveni en la ĉefurbon . . . la Prezidanto tre afable alparolis la kunvenintojn La akcepto estis nia unua surprizo, la dua estis la inaŭguro mem . . . La ceremonio estis tiamaniere tute oficiala. Poste . . . parolis la Prezidanto Miklas, kies deklaro estis por la Esperantistaro kuraĝa kaj varma simpatio. La unuan fojon ŝtatestro . . . tiel konvinke apogis nian movadon.« »La Esperanta Muzeo en Vieno staras sur firma bazo. Nun unu vorto al francaj samideanoj kaj grupoj: ne forgesu sendi viajn eldonaĵojn, fotografaĵojn, propagandilojn ktp, de kiu ajn jaro ili estas, al Int. Esp.-Muzeo en Wien. Ili pliriĝigos la Muzeon, pri kiu jam ĉiuj gvidlibroj tra Vieno anoncas«. »Al niaj Vienaj samideanoj kaj precipe al s-ro Hugo Steiner estas ŝuldata la Esperanto-Muzeo. Ni menciu, ke tiuokaze nia samideano estis honorata de la aŭstria registaro kiel »registara konsilanto«.«

»L'Esperanto«-San Vito al Tagliamento. Priskribas en longa artikolo la ĉefaĵojn de la aranĝo kaj finas« . . . ke estis dia ideo de alta graveco« kaj diklitere:

»Varbu por IEMW, sendigu al ĝi materialon kaj monon.«

El letero de **S-ro Grenkamp-Kornfeld en Paris:** »mi profitas de la okazo por plej kore kaj amike gratuli s-ron Steiner, kiu jam plene meritis la distingon. Mi tiom pli ĝojas, ke la ŝtataj gvidantoj scipovis pli ĝuste rekoni lian poresp-an laboron — ol kelkaj esp-istaj blufuloj«.

La Domo de Homamo.

Samideano Niŝimura, reprezentanto de Oomoto-movado por Eŭropo kaj direktoro de Oomoto Internacia, sciigas, ke Sinjoro Onisaboro Deguĉi, kiu »venis en la mondon por perfektigi la Dian taskon, por doni fajran baptadon . . . por disvastigi la Dian evangelion tra la mondo« linkomisiis, konstrui »Domon de Homamo« en centra parto de Eŭropo. Tiu Domo estu granda templo de universala kaj supernacia kulturo. La kostojn da proks. 200.000 anglaj funtoj grandparte pagos Oomoto. Oni nun alvokas la ĉiunaciajn homojn, ke ili sendu brikojn por Domo de Homamo kaj opiniojn kaj konsilojn al K. Niŝimura, 124 rue de la Pompe, Paris (10).

Internacia E.-ista Laborkomitato por senalkohola kulturo estis fondata dum XXI. Prez.-s-ino Anna Br mkamp-Weber, instr., Scheveningen, Pansierstraat 22, sekr.-s-ro W. Mudrak, Wien, VIII. Strozzig. 19/18.

Ĉiujn informojn de la provizora centrejo en Wien (aldonu respondafrankon!).

Intern. skriba Supera E.-kurso »Isosek«.

Centra oficejo: Nieuwstraat 62, Hoensbroek, Nederlando. — Skriba kurso, tute nova sistemo, por progresintoj. Preparo al ekzameno por E.-instruisto kaj kursgvidanto. 24 tre ampleksaj presitaj lecionoj dusemajnaj. Senpaga abono de gazeto »Nia Informilo« por ĉiu kursano. Prezo de la kurso S 3.— pomonate. Informojn donas la direktoro de la nacia oficejo aŭstria: Pro. Fr. Meŝtan en Krems, Piaristen-Kollegium.

Kvara Aldono al U. V.

Oficiala listo de la novaj flanke de Esperantista Akademio aprobitaj vortoj:

abituriento	Abiturient
abstini	enthaltsam sein, abstinent leben
akselo	Achselhöhle
aktuala	zeitgemäß
akvaforto (gravuraĵo)	radiertes Blatt
albino	Albino
aleno	Ahle
aloo	Aloe (Pflanze)
aluminio	Aluminium
amara	bitter
amoro	Liebesgott, Amor
anilino	Anilin
aŭtonoma	sich selbst Gesetze gebend, selbständig, unabhängig

bireto	Barett
bis	noch einmal!
bombasto	Bombast, schwulstige Redeweise, Redeschwall
ceramiko	Töpferkunst
ĉevrono	Dachsparren
derivi (tr.)	ableiten, herleiten
diluvo	Wasserflut, Sintflut
dimensio	Ausdehnung
doko	Dock
ekzakta	genau
empirio	Empirie, methodische Erfahrung
establi	errichten, einrichten, anlegen
fagoto	Fagott, Basspfeife
fikcio	Erdichtung
genciano	Enzian
genisto	Ginster
grundo	Boden (in Bezug auf seine Beschaffenheit)
ĝemelo	Zwilling
hegemonio	Vorherrschaft
helico (meĥ.)	Propeller, Schiffsschraube
hipnoto	Zwangsschlaf
humo	Gartenerde
imuna	seuchenfest
inaŭguri	einweihen, feierlich eröffnen
indekso	Inhaltsverzeichnis
indigo	Indigo
indiĝeno	Ureinwohner, Eingeborener
inerta	träge, unwirksam (chem.)
inflamo (med.)	Entzündung
intelekto	Verstand, Erkenntnisvermögen
intensa	intensiv, hochgespannt, kraftwirkend
inundi	überschwemmen
inversa	umgekehrt
kalio	Kalium
kalva	kahl(köpfig)
karbono	Kohlenstoff
kastanjeto	spanische Tanzklapper
kinino	Chinin
klaĉi	Klatschereien machen
kloro	Chlor
kluki	glucken
knari	knarren
koincidi	(zeitlich) zusammenfallen
kolizii	zusammenstoßen
komisiono	Ausschuß
kondicionalo	Bedingungsform (gram.)
konkeri	erobern
konsekri	weihen, einsegnen, heiligen
kontinua	fortgesetzt, fortlaufend, ununterbrochen
korolo	Blumenkrone
kreditoro	Gläubiger
kvereli	sich zanken
lameno	Lamelle, Plättchen
lamenti	jammern, wehklagen
lato	Latte
latero	Seite (geom.)
lenso	Linse (Glas)
lobo (anat., bot)	Lappen
lordo	Lord
lumbriko	Regenwurm
medolo	Mark (in Knochen u. Pflanzen)
merkato	Markt
munti	aufstellen (eine Maschine), montieren, fassen (einen Edelstein)
murdi	morden
narkoti	narkotisieren
naso	Fischreuse
natrio	Natrium
oksido	Oxyd
oleandro	Oleander, Rosenlorbeer
orbito	Augenhöhle, Planetenbahn
panelo	Vertäfelung an ein. Zimmerwand
paŝtelo	Pastellstift
patricio	Patrizier, Altbürger
pedagogo	Pädagog, Schulmann, Erzieher
pedagogio	Pädagogik, Erziehungslehre
pelerino	Schultermäntelchen, Pelerine
pioĉo	Karst (Hacke)
pivoto	Zapfen, Drehstift
plago	Landplage
plantago	Wegerich (bot.)
plastiko	Plastik, Modellierkunst
plebo	Plebs, Pöbel, niederes Volk
pluraj	mehrere
pluralo	Plural, Mehrzahl
podio	Podium
provoki	herausfordern provozieren
redukti	zeduzieren, zurückführen, vereinfachen (math.)
regento	Reichsverweser
rezisti	widerstehen, wiederstreben, sich widersetzen
sacerdoto	katholischer Priester
sekura	sicher, außer Gefahr
skemo	Schema
solventa	solvent, zahlungsfähig
spleno	Spleen
stameno	Staubfaden
stipendio	amtliche Geldunterstützung für Schüler, Stipendium
subvencio	Geldunterstützung
ŝpato	Spaten
trafiko	Verkehr
uzuro	Wucher
valida	rechtsgültig, geltend
varo	Ware
vizo	Visum
volumeno	Volumen, Rauminhalt, Umfang
zefiro	Zefir, lauer Wind

Al la nunjara Librotago!

Pere de **ni** haveblaj:
»En Okcidenta nenio Nova« Rm. 5.—
»Miraklaj aventuroj de s-roLongkrurulo« S 3.50
»Gvidlibro Wien«, ilustr. S 1.50

Gravaĵoj.

Grava alvoko!

Radiostacio Hilversum disaŭdigos en la kadro de Internacia Programo »Aŭstrian muzikon« la 21. de nov., je la 8 h. vesp. La unuan fojon oni provos anonci la programerojn en Esperanto. Helpu, por ke ĉi tiu uzado de E. estu daŭrigata, kaj sendu en germana lingvo al Radiostacio en Hilversum, Nederlando, dankesprimon pro la bela programo kaj la uzado de internacia interkomprenigilo.

Radio Frankfurt-Kassel. La kurso finiĝos, sed la stacio disaŭdigos neregulajn E.-paroladojn, se la geaŭskultantoj tion deziros. Ĉiu poŝtkarto firmigas nian pozicion!

Foiro en Reichenberg. (17.—23. VIII.) Ligo de Germanaj E.-istoj en Ĉeĥos ovakio sukcesis, ke la foiro mem faris propagandon por E.: Granda flago, flirtis, E.-afiŝoj kaj glumarkoj estis eldonataj, E.-surskriboj sur la klarigaj tabuloj. GEL havis sur oportuna loko du grandajn tabulojn kun germana teksto pri Esperanto. En la halo pendis grandegaj ŝildoj kun diversaj surskriboj, ekz. »Der moderne Kaufmann verwendet Esperanto«. Efikplena estis fervoja semaforo kun la vortoj »Bahn frei fü Esperanto!« La Ligo havis propran belan standon, en kiu oni vidis simbole grandegan pezilon, sur kies unu plado estis dek kuboj (reprezentantaj la diversajn lingvojn) kaj sur la alia plado staris sole la Esperanto-stelo, efikanta egalpezon. Ni elkore gratulas al la prez. de la Ligo, nian pioniron prof. inĝ. Scholze!

Nia pioniro **pastro Andreo Ĉe** gvidis de 14.—26. de okt. kursojn en Riga. Kiel ĉiam granda nombro partoprenis.

ILEPTO: En la ĉijara mondkunveno dum XXI-a en Budapest s-roj d-ro Spielmann-Bern estis reelektata prez., Rob. J. Filliâtre en St.-Cyr-l'Ecole ĝen. sekr. kaj Pierre Filliâtre-Paris red.-administr.

Datreveno. Unu el la plej malnovaj Laboristaj E.-grupoj, tiu en München festis la 5. okt sian 20-an datrevenon Radio-Moskvo je tiu okazo disaŭdigis en la nomo de Komintern Esp.-programon. (»Sennaciulo«)

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista havas novan adreson: Praha XII. Londynska 13 kaj eldonas novan **»Bultenon de ĈAE«** tute ne dependan de »La Progreso«, kiu ĉesas esti oficiala organo de ĈAE.

Antwerpena Poresperanto Propagando Komitato solenis la 26. de oktobro la 5 jaran datrevenon de sia fondo.

VIII-a Kongreso Internacia de Ido 7.—10 VIII. unuigis 40 anojn de ĉi tiu »sistemo« en Freiburg, Baden. Malgraŭ la tie faritaj decidoj ni povas trankvile dormi.

Dum XIV. Itala Kongreso de E., kiu bonege sukcesis (28.—30. VII.), grafino di Caporiacco, edzino de l' urbestro en Udine, estis baptopatrino de standardo por la Grupo en Trieste.

Kvara Nederlanda E.-Kongreso okazis 21.—22. IX. en la bela ĝardenurbo Arnhem apud Rhein. Pro la proksima germana limo aro da germanaj samideanoj ĉeestis.

24. Skota E.-Kongreso en Glasgow de l' 6.—8. IX. bonege sukcesis. S-ro Goldsmith, administranto de BEA venis en la la nova propagandaŭtomobilo.

E.-Kongreso de Byalistok-a Vojevoda Regiono okazis la .26—27. X. sub la protekto de la Bialystok-a Urbestro W. Hermanowski.

Buenos Aires (Argentinio). Dum ta lasta nacia kongreso fervojista oni decidis, peti la Argentinan Laboristan Konfederacion, patronigadi la instruadon de E. konsiderante ĝin kiel internacian lingvon por ĉiuj argentinaj laboristoj.

Minas Geraes (Brazilio). D-ro Teixeira de Freitas intencas eldoni gvidlibreton pri Minas Geraes en E.

Kosta Riko. Pri la E.-movado informas prof. Hector Fernandez Varens, calle Gral Fernandez, Alajuela.

Ekvatoro. Fervore laboras tie s-ro Efren Castillo L. (Escribanin dro Cabezas), Pasajo del Palacio de Gobierno, 3er., piso, Guayakil, Ecuador

En **Persujo**, kie triono de la intelektularo estas bahaa, E. progresas bonege.

»Ŝlosilo« aperis nun ĉe E.-Klubo en Ljubljana, Jugoslavio, en slovena lingvo. Prezo 3 Din. Mendebla ĉe la grupo.

Nova BES-Adresaro 1929/30 (8-a eld) aperis ĵus kaj enhavas pli ol 900 adresojn diverslandajn el ĉiuj kontinentoj, tre utila por korespondantoj kaj kolektantoj, la prezo sv. fr 1.—. Jam nun vi aliĝu al la 9-a eld.! Simpla aliĝo sv. fr. —.50, kun adresaro 1.—. Skribu al BES-Adresaro, Potŝtejn, Ĉ. S. R.

La Unuigita Tuthomaro, »Die geeinigte Menschheit«, ĉesis de fino de 1927. Nun ĝi reviviĝis kaj ni deziras, ke tiu dulingva tre interesa revueto fortiĝu. Mendu provnumeron de **Wilhelm Heydorn, Hamburg-Blankenese, Weddigenstr. 1.**

Eldonejo »Esperantista Voĉo«, S. Grenkamp-Kornfeld, Jaslo, Polujo. dissendis novan 4 paĝan librokatologon 1929.

»Monde«, la semajna revuo redaktata de Henri Barbusse, enhavas rubrikon »Mondo Esperanta«.

Niederösterreiche Donaupost havis artikolon »Die Welthilfssprache Esperanto« de Käthe Haselbauer (3. 11. 29)

Pieŝtany, 4 paĝa gvidfolieto, eld. de la banloka estraro sub aŭspicioj de Turisma Servo de UEA.

Benediktiner Missionskloster Schweiklberg apud Vilshofen ĉe Danubo (Bavarujo) dissendas siajn propagandilojn koncerne sian Balsamo de San Luis en E.

Aŭstria Esperanto-Asocio
I. Augustinerstraße 7

Aŭstria E.-Kongreso 1930.

La 8. nov. prez. de AEA. estis en Linz kaj priparolis kun la tieaj s-anoj la detalojn pri la aranĝota kongreso. Ĝi ne okazos — kiel ĝis nun kutime — dum Pentekostoj, sed antaŭ la XXII. (Oxford) por ŝpari al la aŭstriaj s-anoj, kiuj veturos al Oxford la dufojan veturadon kaj pli efikigi la kongreson per ĉeesto de la al XXII. veturantaj alilandanoj.

Certe niaj fervoraj Linz-aj samideanoj aranĝos belegan kongreson.

Elkoran gratulon al nia fervora samideano, s-ro reg. kons. d-ro Franz Scholz en Liesing okaze de la 70. datreveno de lia naskiĝtago.

Linz: La grupo eldonis 5 diversajn artecajn poŝtkartojn kun E.-teksto. Surpresis ilin presejo Lanz, nia s-ano.

Fervora s-ano Mraz gvidas 2 kursojn, bonege vizitatajn, laŭ Ĉe-metodo.

Ried i. I. Depost 1. 10. nova kurso kun 33 partopren. Gvidanto UEA.-del. fakinstr. Jungschaffer, nia senlaca propagandisto. Pli ol duonon de la kursanoj varbis s-ano Ecker per modela kleriga propagando.

Ried i. I. Ambaŭ lokaj gazetoj raportas pri E.

Wels: Prof. Paar gvidas kurson en Handelsschule, kiun pagas la urbo. Jen bona ekzemplo por aliaj komunumoj!

E.-grupo Gajeco-Wien, 16. havis la 30. de sept. amuzan vesperon, dum kiu fakinstr. Dittrich faris paroladon pri Mondkongreso en Budapest kaj s-ro Chiba pri kat. Kongreso en Praha. Fine parolis Pro. Kudrnovsky.

E.-Organizo de la Oficĥavantoj: 16. okt. okazis en granda festsalonego de magistrata domo en IV. distrikto parolado de s-ino Amalia Berger en germana lingvo «La mondlingvodemando kaj Esperanto«. — Kursoj por komenc., progres. kaj preparo al ŝtata ekzameno komenciĝis.

Wien: Katol. Submajstra Unuiĝo, 6. Gumpendorferstr. 39: Kurso ĉiun merkredon kaj en junularhejmo, 16. Arnethg. 28 mardon je 1/28 vesp.

Kat Unuiĝo E.-en Wien. Kursoj: I. Freyung 6, Schotten-Pfarrkanzlei, ĉiun sabaton je la 4-a (por komenc.) kaj je la 1/26-a (por progr.), V. Arbeitergasse 24, Karolinum en la taghejmo ĉiun dimanĉon je la 11. attgm.

Unua E.-Unuiĝo en Wien kunvenas de nun ĉiuvendrede je 19 h 30 en nova klubejo I. Himmelpfortgasse 6 (kafejo Frauenhuber). Gastoj bonvenaj! La 11. X. d-ro Sós faris referaton pri Paneŭropo, la 18. s-ro Hovorka pri »Kaŭzoj por kaj kontraŭ Paneŭropo«.

Hildegardo-festo.

Okaze de 750jara datreveno de l' morto de S. Hildegardo Kat. Unuiĝo Esperantista en Wien aranĝis la 22. de sept. Sanktan Meson en Minoritenpreĝejo kun prediko kaj ptgm. festkunvenon en Kalasanzsaal, VIII. Piaristeng. 43. La festparoladon faris lia priora moŝto Wolfgang Nedwid. Pri XXI-a raportis lia provinciala moŝto P. Franz Meŝtan, pri XIV. Katolika Mondkongreso en Praha s-ro Chiba. Sekvis amuza parto kun pianoforteludo (s-roj Chiba kaj Walka juna), kanto ktp.

Rimarkindaj presaĵoj.

Im **Esperanto-Verlag Wallishauser**, I. Liechtensteg 1 erschien Hans Sassmanns »Metternich«, kart. 5.60 in deutscher Sprache. Jeder, der dieses Drama, das reich an ausgeprägten Charakteren und leidenschaftlichen Szenen ist, in unserem Burgtheater gesehen hat, wird dieses Buch gerne nachlesen, jeder, der es nicht gesehen hat, lese es wenigstens!

Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Dr. Emil Pfeffer, Tagblatt-Bibliothek Nr. 335, 3. ergänzte Auflage, 11.—15. Tausend.

En pli bela vesto prezentiĝas la 3. eldono de ĉi tiu vortaro, kiu jam enhavas la »Kvaran oficialan aldonon de la Esperantista Akademio al Universala Vortaro«. 48 pĝ., la prezo restis la sama malmultekosta —'50 gr.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) »Pastete«, Sporg. 28, Do (ĵ) 20–23 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20–22 h.

Innsbruck.

Esperanto-Klub, Gasthof »Grüner Baum«, Museumstraße. Mi (me) 20–22 h.



Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenho (Akademikerheim) Mi (me) 18·00–20·00 h

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Annagasse 5, I-a et., klubejoj de »Politische Gesellschaft«, Fr. (v.) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schäffergasse 3, Mi (me) de 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17–19 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Cafe Elsahof, Mo (l) 19–23 h.

Esp.-societo »Fideleco«, Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16–19 h.

V. b. b.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg 248. — Presejo: Franz Reifmüller, Wien, I, Johannesgasse 6